

Argentina E-Vento

Oficiala organo de Argentina Esperanto-Ligo
13-a jaro n-ro 34 julio / septembro 2008 [3]

Esperanto en Ameriko



TAKE sesio, (foto: P. Hernández)

La 7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto okazis en Montrealo, Kanado, kune kun la ELNA-Kongreso de la 11-a ĝis la 18-a de julio 2008.

Legu pliajn informojn
sur paĝo 8

Argentina E-Vento

13-a jaro n-ro 34 jul / sep 2008 [3]
Oficiala organo de Argentina Esperanto-Ligo
[Argentina Esperantisto 1917-1995]
Aperas kvaronjare/*Trimestral*
Dissendita al 31 landoj - Interŝanĝo dezirata

Redaktoro -ekde 1996-

Rubén T. Diaconu Tkachenco
Calles 119 y 122
AR-H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña, Chaco
Argentino
rubendiaconu@yahoo.com.ar

Kunlaborantoj:

Rubén Sánchez: esperanto@neunet.com.ar
Emmanuel Maggiori:
emmanuelmaggiori@gmail.com

*Pri la subskribitaj artikoloj respondecas
iliaj aŭtoroj kaj ili ne nepre reflektas la
opinion de AEL aŭ de la redaktoro.*

Argentina Esperanto-Ligo

Fondita la 12-an de aprilo 1941
Re-fondita surbaze de AEL-AEA
la 9-an de decembro 1995
TTT-ejo: www.esperanto.org.ar

AEL-Estraro

Alcides P. Wentinck: *prezidanto*
René Arce: *vicprezidanto*
Jorge E. Cabrera: *sekretario*
Fernando Inocencio: *vicsekretario*
Jorge Cabrera – *kasisto*
vakas – *vickasisto*

Komisiitoj

Instruado: vakas
Libroservo: Jorge Cabrera
Disvastigado: Silvia Rottenberg
Arĥivo: Roberto Sartor
UEA-Komitatano A: vakas
Kotizperanto, p/AEL –
UEA-Ĉef-delegito: Rubén L. Sánchez
Komitatano A de TEJO: Cecilia Prudkin
Argent-EJO: Daniel M. Lucero

El la Redaktejo



Karaj legantoj.

Printempas ĉe ni kaj post paso de pli ol duono de la jaro, ni havas tre interesajn informojn pri la gravaj okazintaj kongresoj, t.e. la internacia UK en Roterdamo kaj nia tutkontinenta TAKE en Montrealo. Restas nur, por venonta numero, informo pri la Brazilia Kongreso okazinta en Fortalezo. Bonan legadon!

Via Redaktoro

Enhavo

Esperanto en Ameriko

sur kovrilpaĝo foto pri TAKE-sesio

El la Redaktejo.....	2
Análisis / Noticias / <i>Hispanlingva rubriko</i>	3
Tra la lando.....	6
Amerike	8
Internacie	10
Anoncoj / Dankesperimoj.....	19
Distraĵo / Por la animo / Literaturo.....	20

Argentina E-Vento

Legu laŭ PDF-versio ĉe:

www.gazetejo.org/node/651

Via E-revuo ankaŭ povas aperi en ttt-ejo

La Esperanta Gazetejo:

www.gazetejo.org

Novedades del esperanto y su entorno

AEL y diversas actividades del esperanto han sido reflejados en medios de comunicación de nuestro país y del exterior

■ Difusión

Alejandro Cossavella: invitado a viajar a Polonia

Alejandro Cossavella, miembro de AEL, residente en Bariloche, es muy conocido entre nosotros y en todo el Movimiento Esperantista, por sus exitosas composiciones musicales, que son cantadas en todo el mundo.

Recientemente Alejandro ha sido invitado a participar del **24^o Arkones**, (*Artaj Konfrontoj en Esperanto*), que se realizará del 19 al 21 de septiembre de 2008, en Poznan, Polonia. “Arkones” es un festival y concurso anual de canciones esperantistas organizado por la “Juventud Esperantista Polaca” y cuenta con los auspicios de UEA.

Alejandro Cossavella, en 1998, fue premiado en el “Belartaj Konkursoj” de UEA por su canción “*Ĉe Montpellier*” y desde entonces ha sido invitado en numerosas ocasiones a participar en festivales



esperantistas del exterior, en Brasil, Francia, Suecia, etc.

Su último disco compacto “*Civilizacio. Strika Tango*” editado por Vinilkosmo en Francia, fue positivamente comentado en *Esperanto*, la revista de UEA (Januario 2007, p. 15)

Alejandro Cossavella, dirige un programa de Radio en Bariloche, tiene su blog en internet, y como escritor esperantista uno de

sus artículos apareció en la revista literaria *Beletra Almanako* (n-ro 2, Marto 2008)

Lo más reciente de Alejandro Cossavella se encuentra en *You Tube*, donde canta un tango en esperanto. El periódico *Noticias de Bariloche* se hizo eco del éxito que

ha tenido **Alejandro Cossavella**, al grabar el tango “*Por una Cabeza*”, de Gardel-Le Pera, en esperanto y divulgarlo en video a través del portal *You Tube*.

Su tango ha tenido repercusión a nivel internacional. Un orgullo para nuestro Movimiento Esperantista.

Preparando ya su viaje, Alejandro estuvo en Buenos Aires durante algunos días.

Le auguramos una feliz y exitosa gira europea.

Contacto: espomuzik@gmail.com

volúmenes de 300 páginas. Algunos artículos constan de tan solo una frase. Otros, como el artículo sobre delfines

<http://eo.wikipedia.org/wiki/delfenoj>
o sobre el muro de Berlín

http://eo.wikipedia.org/wiki/berlina_muro,
contienen una presentación detallada sobre un tema definido.

Con el vigésimo lugar alcanzado en Wikipedia el idioma esperanto confirma su posición entre las lenguas más utilizadas

Aunque el primer libro para aprender esperanto se editó en 1887, hace tan solo 121 años, la lengua actualmente es hablada por personas de más de cien países en el mundo. Hoy ocupa uno de los primeros lugares como lengua internacionalmente hablada por lo que se le puede llamar "la lengua de mayor avance del siglo veinte".

Ninguna otra lengua, de las 6.000 que se hablan en el mundo, pudo mejorar su posición en tan solo un siglo desde el último

Wikipedia en esperanto ya alcanzó y superó los 100.000 artículos

Todos conocen el proyecto Wikipedia, para la creación de una enciclopedia libre en Internet.

El proyecto ha resultado tan exitoso que ya tiene versiones en más de un centenar de idiomas.

En el mes de noviembre del año 2001, comenzó su redacción en esperanto y en este momento Wikipedia ya ha sobrepasado la cifra de los **cien mil artículos**.

Considerando de que se trata de un proyecto ejecutado por voluntarios, se debe calificar de muy exitoso el logro alcanzado en **esperanto**, que se encuentra ya entre las primeras veinte lenguas con mayor número de artículos.

El fenómeno Wikipedia en todos los idiomas está resultando un prodigioso medio auxiliar de los docentes en las escuelas y los usuarios autodidactas de Internet.

Ya los sociólogos empiezan a hablar de la “*generación de la cultura Wiki*” tanto como de la “*Google generation*”

Sin duda el fenómeno resulta muy positivo para los hablantes de la lengua internacional en todo el planeta.

Los esperantistas encontrarán en su **VIKIPEDIO** siempre actualizada, toda la información necesaria, (ver Argentina E-Ligo), lo que redundará en progreso de la difusión del esperanto y la calidad cultural de los esperanto hablantes.

internacionalmente. El idioma esperanto es una de las nueve lenguas en que el Centro Chino de Información por Internet, <http://esperanto.china.org.cn> publica sus noticias. El buscador de *Google*,

<http://www.google.com/intl/eo/> entre sus 42 lenguas ofrece búsquedas en esperanto

www.google.de/preferences?hl=eo

La versión española de Wikipedia tiene actualmente alrededor de 370.000 artículos.

lugar hasta estar entre las 50 más ampliamente habladas.-

*Artículo de
Lu Wunsch-Rolshoven (Alemania)*

Elaboró: Martín Schaeffer.

Tradujo al español:

Daniel Moreno Martínez.

esperantst@gmail.com

UEA-libroservo: la más importante librería del mundo en esperanto

A través del **Libroservo** de *Universala E-Asocio*, cuya sede opera en Róterdam, (NL), es posible adquirir y leer las más diversas obras escritas, o traducidas, en esperanto. Libros, DVD, CD, etc. Según la revista *Esperanto*, sección “*Laste aperis*”, estas son algunas de las ediciones recientemente publicadas y disponibles para adquirir.

Beletra Almanko 2. (Marto 2008)

Autores varios. 144 páginas. Relatos, prosa, poesía. Originales y traducidas. E 10,00 (*)

107 krucenigmoj en Esperanto.

Stano Marcek. 2008. 88 páginas. Crucigramas diversos niveles, ilustrado. E 12,00

Vojaĝo en Esperanto-lando.

Boris Kolker. 2002. 280 páginas. Curso de perfeccionamiento e introducción a la cultura del esperanto. Por sexto año el libro más vendido. E 18,00

Esperanto elektronike.

La mayor información sobre esperanto y su cultura, curso, diccionario, música, fotografías, videos, revistas, etc. DVD para computadora. E 9,00

(*) Los pedidos pueden efectuarse directamente a: **Universala E-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Róterdam, Holanda.**

Al costo debe agregarse 10% para los gastos de envío. Pedido mínimo 4,00 euros. Los pagos pueden efectuarse con tarjetas VISA, Master Card, American Express. El catálogo de las obras disponibles puede consultarse en: <http://www.uea.org/katalogo/>

Tra la lando

■ Instruado

Oni permesis instrui Esperanton en publika lernejo

Prof. René Arce, membro de la Estraro de AEL, estas instruado en publika malgranda lernejo de la provinco de Córdoba, en vilaĝo “El Saladito”.

Li jam ricevis permeson de la Eduka Ministerio por enirigi oficiale Esperanton unu horo semajne en la kursoj, inklusive akceptinte lin en sia rango kiel regiona docento de la Argentina Lernejo de Esperanto.

Ĉar la lernejo enhavas ĉefe infanojn li uzas la video-kurson “Mazi en Gondolando” bonege akceptita de la gelernantoj kiuj rapide memoriĝas vortojn kaj frazojn, kantas kaj interbabiladas.

Kontaktoj: arserene2002@yahoo.com.ar

Forpaso

S-ro Carlos Uría (1929-2008), edzo de nia kara kaj altestimata Silvia Rottenberg, forpasis la 1-an de aŭgusto.

Nome de Argentina Esperanto Ligo kaj Bonaera Esperanto Asocio ni esprimas elkorajn kondolencojn al Silvia kaj familianoj. Sincere ni deziras spiritan fortostreĉon en ĉi tiu momento de profunda bedaŭro.

*Alcides Pieter Wentinck
Jorge Enrique Cabrera*

Se aprobó la enseñanza del esperanto en una escuela de Córdoba


= Junio de 2008

El Prof. René Arce, informa que su solicitud para enseñar el esperanto en la escuela, donde es docente, ha sido aprobada por el Inspector del *Ministerio de Educación Provincial* en Córdoba.

René Arce, es miembro del Comité de AEL y actúa en calidad de docente regional de la **Escuela Argentina de Esperanto**, en la Escuela Rural de “El Saladito”, en el norte de la provincia de Córdoba. Siendo una escuela primaria ha optado por utilizar el video-curso “**Mazi en Gondolando**”, de gran aceptación entre los niños, que facilita la memorización y el rápido uso interactivo de la lengua.

Contactos:

arserene2002@yahoo.com.ar



Prof. René Arce

■ Curso en el Chaco

Esperanto en el Instituto CE.CU.ID.

El Club Saenzpeñense de Esperanto (SEK), informa que desde el 19 de agosto, y hasta el 15 de diciembre de 2008, se estará dictando un nuevo Curso Elemental de Esperanto. Las clases están a cargo del esperantista Alejandro Pedro Ojeda. El curso es organizado por SEK y auspiciado por el Instituto CE.CU.ID., Centro Cultural de Idiomas “Jorge Amado”, U.E.P. N° 124, de Pres. R. Sáenz Peña, Chaco. Las clases se desarrollan en dicho Instituto los días martes de 20:30 a 22:00hs.

■ Ekspozicio 2008

Esperanto en Eduka Ekspozicio 2008

Kiel en la pasinta jaro 2005, nome de AEL kaj BEA, meze de aŭgusto, oni partoprenis en la “4-a Eduka Ekspozicio”. Kun propra budo eblis diskonigi kaj disvastigi Esperanton al



lernejanoj (4-a kaj 5-a niveloj) kaj al la ĝenerala publiko. Plian informon vi trovos en venonta numero.

Amerike

Kongresoj en Ameriko

TAKE en Montrealo



De la 11-a ĝis la 18-a de julio 2008, Montrealo ricevis la **7-an Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto**, kies temo estis **“Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj: diverseco por daŭripova evoluigo en la Amerikoj”**. La kongreso, kune estis organizata de Esperanto-Societo Kebekia, Esperanto-Klubo-UQAM, kunlabore kun UEA (Univerala Esperanto-Asocio) kaj Esperanto-USA.

Université du Québec à Montreal bonvenigis pli ol ducent (220 registritaj) partoprenantojn el dekkvino da landoj, komunikantajn per unu komuna lingvo. La prelegoj, debatoj, diskutrondoj kaj praktikumoj helpis la kongresanojn skizi agoplanon favore al evoluigo vivebliga kaj justa, kiu ankaŭ protektas kaj valorigas la diversecojn ekologiajn, lingvajn kaj kulturajn.

Ĉiujare miloj da specioj malaperas. Tio ne nur malfortigas niajn ekosistemojn, sed ankaŭ faras nian vivon malpli kvalita.

Unuiĝintaj Nacioj Organizo proklamis la jaron 2008 “Internacia Jaro de Lingvoj”. Dum la venonta jarcento, povus pereji pli ol duono de la nunaj 7000 lingvoj de la mondo. Tiam samtempe malaperus la korespondaj multegaj kulturoj, kun iliaj valorsistemoj, manieroj rilati al la medio kaj konoj, kiuj povus montriĝi tamen nemalhaveblaj por helpi la homaron solvi la problemojn, kiujn ĝi frontas.

Ĉi tiu TAKE estas la sepa en la serio de Tut-Amerikaj Kongresoj de Esperanto, celantaj trakti gravajn temojn, uzante Esperanton kiel

komunikilon. Tiuj renkontoj estas krome okazoj por ekzameni la staton de Esperanto en la Amerikoj, kaj la valorojn antaŭ-enigatajn de la Esperanta komunumo: demokration, transnacion edukadon, lingvan diversecon, lingvajn rajtojn, homan emancipadon kaj kulturon de paco.

<http://www.take7.ca/aliĝintoj.html>
fotoj: Pedro Hernández kaj TAKE-web



E-Muzikgrupo JoMo



Kongresanoj dum indiĝena danco



Dum kongresa ekskurso

“Amo estas plej alta leĝo el tiuj, kiuj regas la socion”

Legio de Bona Volo, LBV, (*Legion da Boa Vontade*), estas brazila organizo de la tria sektoro, institucio kiu agadas en Brazilo kaj mondscale ekde 1950. LBV plenumas sociedukan laboron favore al la tuteca elvolviĝo de la Homa Estulo kaj sia Eterna Spirito. Ĝia agado disvolviĝas en pluraj landoj kaj estas rekonata internacie de Unuiĝintaj Nacioj (UN). Esperanto estas lingvo uzata de LBV por disvastigi ĝian mesaĝon pri Amo kaj Solidareco kaj fare la Departamento pri Esperanto de LBV oni eldonas la revuon BONA VOLO. Ĉi tiu estas penso de la verkisto Paiva Netto, Direktoro-Prezidanto de LBV: “*Ekumenismo estas natura kondiĉo kaj spontana deziro de ĉiu natura homo, kiam li per korpo kaj Animo integriĝis en la spiriton de Paco.*”



Bona Volo n-ro 63



Vi povas viziti la paĝon de LBV: www.bonavolo.com en esperanto, portugala, hispana kaj angla lingvoj.

Ursula Grattapaglia, kiu de multaj jaroj faras socian kaj edukan laboron kun brazilaj infanoj en la bieno Bona Espero, situanta en la urbo Alto Paraíso de Goiás/GO, dankis al la Institucio porti solidarecon kaj reciprokan respekton, kaj esprimis: “*LBV flegas Esperanton kiel rimedon por edukado de la tutmonda civitaneco. Mi deziras, ke ĝi daŭre sentu motivigata sentebliĝi la novajn generaciojn. Ni ricevis la porinfanajn librojn de LBV kaj la infanoj (de Bona Espero) legas ilin kun miro, ĉar temas pri belaj publikaĵoj kiuj vekas scivolemon. Gratulon!*”

Oni devas mencii, ke LBV agadas ankaŭ en Argentino: www.lbv.org.ar

La 93-a Universala Kongreso okazinta en Nederlando

La 20-an de julio estis inaŭgurita la 93-a Universala Kongreso de Esperanto, kies aliĝintaro superis 1800.

Pri la impona programo de la UK eblas legi per la Kongresa Kuriero, kiu ĉi-foje nomiĝas "Jubileanto", inspire de la 100-jariĝo de UEA. La numeroj de "Jubileanto" (1-6) estas legeblaj kaj eĥuteblaj ĉe la adreso:

<http://uk08.lafontano.net/informilo.php>

Tamen ĉi-tie ni prezentas kelkajn plej rimarkindajn kaj interesajn okazintaĵojn pri la sukcesa Kongreso.

Ĝenerala programo

Solena Inaŭguro

La granda festo pri la centjariĝo de Universala E-Asocio komenciĝis dimanĉon matene per inaŭguro de la 93-a UK. Pli ol 1800 partoprenis en la salono Zamenhof de la kongresejo, krom la UEA-prezidanto, ĉefaj gastoj, ambasadoroj kaj komisiitoj de pluraj landoj. Post legado de salutoj de la lokaj aŭtoritatoj, inter kiuj telegramo de la reĝa familio, vicprezidanto de UEA legis tre varman mesaĝon de la ĝenerala direktoro de UNESCO.

Post tiuj salutvortoj, kelkaj ĝojigaj anoncoj kaj muzika paŭzo estis la fina sekvo

de salutoj nome de TEJO, ILEI, Akademio de Esperanto, SAT kaj urbestro de Esperanto-urbo Herzberg. Almenaŭ 73 landoj ĉeestis la kongreson, salutis kaj kune ĥore kantis E-himnon "La Espero".



Impona kongresejo en Roterdamo

Kelkaj rimarkindaj kunvenoj

Pri la pluraj kunvenoj okazintaj dum unu semajno da programo, oni povas mencii jene: La **Komitato de UEA**, kiu kunsidis sabate por diskuti kaj pritrakti la jaran agadon, kaj decidis pri subkomitatoj kiuj daŭrigis sian laboron dum la kongreso.

ILEI, aliĝinta fakasocio de instruistoj kiu prizorgas la E-instruadon.

Subkomitato pri Informado, unu el la ok kunsidoj. La diskuto temis pri la diferenco inter informado al membroj kompare kun informado al ekstera mondo.

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, kun 26 ĉeestantoj aprobis la raporton 2007 kaj diskutis pri plibonigi la agadon de la asocio.

Subkomitato pri Landa kaj Regiona Agado, kunsidis por diskuti la plurajn landajn raportojn.

Amerika Agado, kiu okazis kun ĉeesto de 60 partoprenantoj. Post raporto de la Amerika Komisiono pri la jara agado, oni prezentis informojn pri la 7-a TAKE kaj pri diversaj projektoj kiel estonta Centra Oficejo kaj renovigo de la retpaĝaro. Oni pridiskutis bezonojn kaj prioritatojn de la regionaj agadoj kaj aŭdis raportojn pri Salvadoro, Meksiko, Kubo kaj Brazilo. La kunsidon gvidis komisionanoj Atilio Orellana Rojas, Martín Schaffer kaj Maritza Gutiérrez González.

LSG - Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj, kunvenis kun ĉeesto de 50 personoj. Post anonco pri ekskurso kaj pritarki la plibonigon de la bultena servo, oni elektis novan prezidanton kaj reelektis la sekretarion. Krome 34 LSG-anoj estis akceptitaj de estraranoj loka CDC –seksio *Schiedamsesingel*.

Amikoj de Bruno Gröning, prezentis prelegon “Sanigo per spiritaj fortoj laŭ instruo de Bruno Gröning”, en kiu estis klarigite, kiel oni povas mem akcepti la spiritan sanigoforton. Krome medicina kuracisto prezentis dokumentojn pri malsanoj nesaniĝeblaj laŭ la klasika medicino: unue ostoporozo kaj due malbona aŭdkapablo ekde la infana aĝo.

UMEA - Universala Medicina E-Asocio, kun 40 kolegoj el 20 landoj raportis pri la okazinta 16-a Internacia Medicina Kongreso en Krakovo, (PL). UMEA centjariĝas ĉijare.

TEVA - Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio, kiu ankaŭ centjariĝas, instigis la ĉeestantojn al kunlaboro por disvastigi kaj propagandi Esperanton dum neesperantistaj vegetaranaj aranĝoj.

IFEF - Internacia Fervojistaj Esperanto-Federacio, kunvenis kun ĉeesto de 55 personoj el 12 landoj. La agada raporto temis precipe pri la 60-a IFEF-kongreso. Laŭ la opinioj de la ĉeestantoj gekolegoj oni devas labori

Mesaĝo de UNESCO al la 93-a UK

Ĉi tiu kongreso okazas je tute taŭga momento: duone tra la Internacia Jaro de Lingvoj 2008. Kiel esenca dimensio de homa ekzistado, lingvoj ĉiam estis en la kerno de la misio de Unesko, kaj ni ludas gvidan rolon en la kunordigado de agadoj tra la jaro. Fakte, lingvoj estas menciitaj en la unua artikolo de nia Konstitucio, kiu diras ke la celo de la organizo estas "kontribui al paco kaj sekureco, stimulant kunlaboradon inter la nacioj per edukado, scienco kaj kulturo por antaŭenigi universalan respekton por justeco, por la regado de leĝoj kaj por la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj (...) sendistinge pri raso, sekso, lingvo aŭ religio."

Ĉi tiu vizio daŭre gvidas la laboron de la organizo, kaj je la labora kaj je la normiga niveloj, en ĉiuj niaj kampoj de kompetento: edukado, sciencoj, kulturo kaj komunikado. Ni laboras por antaŭenigi plurlingvan edukadon kaj multlingvismon en ciberspaco, por savi endanĝerigitajn lingvojn, plifortigi indiĝenajn lingvojn kiel portilojn de scienca scio kaj scipovo, kaj por analizi la ligojn inter la paktikado de lingvoj kaj sociaj transformiĝoj. Nian agadon en la kampo de lingvoj antaŭnelonge plifortigis la kreado de Intersektora Platformo por Lingvoj kaj Multlingvismo. Plie, Unesko laŭ sia propra naturo estas multlingva organizo: niaj gvidaj organoj laboras per naŭ lingvoj, kaj multaj paĝoj kaj temoj en nia Unesko-retejo estas seslingvaj.

Estante centra por la identeco de individuoj kaj reprezentante strategian faktoron por daŭrigebla evoluo, multlingvismo estas nuntempe, en epoko de tutmondiĝo, pli ol iam ajn ŝlosila temo por la estonteco de la homaro. Tial la slogano, kiun ni kreis por la Internacia Jaro de Lingvoj esprimas klare sed elokvente, ke "lingvoj gravas". Kongrue kun la senĉesaj klopodoj faritaj de ĉiuj esperantistoj en la mondo tra la lastaj jardekoj, la 93-a Universala Kongreso de Esperanto reprezentas unikan kontribuon al la afero de lingva diverseco. Tial mi deziras al Universala Esperanto-Asocio, al la organizantoj de la kongreso kaj al ĉiuj partoprenantoj plenan sukceson en iliaj diskutadoj.

Koichiro Matsuura
Ĝenerala Direktoro de Unesko

ankaŭ en la estonteco por membrigi
gejunulojn al la movado kaj kunlabori kun
aliaj fakaj E-asocioj.

Esperantista Kat-Amikaro. “Dum vi ĝuas
la kongreson, kie estas via kato?” –sonis tra
plena salono la demando de Rondo “Kato”,
ĉar kiam ĝenerale dum feritempo kaj vojaĝoj
la homoj ĝojiĝas, ne okazas same ĉe iliaj
hejmbestoj kiuj restas solaj kaj en multaj
kazoj, estas eĉ forpelitaj straten. La plej
originala propono venis de germano, membro
de organizita rondo de najbaroj rotaciantaj
por zorgi pri katoj dum la foresto de iliaj
posedantoj. La plej amuza respondo venis de
hispanino, kiu simple “lasas ankaŭ la edzon
hejme”.

**ISAE - Internacia Scienca Asocio
Esperantista.** Oni klarigis kaj substrekis pri
la vasta diverseco de la temoj pri kiu eblas
verki en Scienca Revuo, la trimonate organo
de ISAE. José Antonio Vergara (Ĉilio),
ĝenerala sekretario de ISAE kaj Estrarano de
UEA, parolis pri la necesoj renovigi la
tradician sintenon pri la ĝenerala temo
Esperanto en la scienco, krei kondiĉojn por
fari alirebla nian riĉan heredaĵon per ĝia
enretigo, kaj ligi tiun heredaĵon al la strebado
por lingvaj homaj traitoj, ekz. scienca
edukado per la gepatra lingvo al infanoj de
lingvokomunumoj minacataj de la nuna
lingva ordo.

Krome ni devas mencii, i.a., kunvenojn de:
**MEL - Muzika E-Ligo; Subkomitato
kulturo kaj kongresoj; Subkomitato faka
kaj scienca agado; Subkomitato edukado;
Subkomitato eksteraj rilatoj; Kristanoj;
INA - Internacia Naturkuraca Asocio;
Rondo por pripensi UK-on; EVA -
Esperantlingva Verkista Asocio; EDE-
Eŭropo Demokratio Esperanto.**

Honora Membro de UEA

En la inaŭguro de la 93-a UK en
Roterdamo la publiko bonvenigis per forta
kaj longa aplaŭdo la decidon de la Komitato

Rezolucio de la 93-a Universala Kongreso de Esperanto

La 93-a Universala Kongreso de Esperanto,
kunveninte en Roterdamo de la 19-a ĝis la 26-
a de julio 2008 kun 1845 partoprenantoj el 73
landoj por diskuti la kongresan temon
"Lingvoj: trezoro de la homaro",

Festante ĉi-jare la centjariĝon de Universala
Esperanto-Asocio,

Notante la gravan rolon de lingvoj en la
konservado de scioj kaj kulturoj, kaj en la
ebligado de malsamaj aliroj al la mondo,

Rimarkante la daŭran diskriminacion
kontraŭ lingvoj je ĉiuj niveloj kaj aparte
kontraŭ la lingvoj de indiĝenaj popoloj kaj
malplimultoj, kaj

Atentigante pri la valoro de la facile lernebla
kaj neŭtrala lingvo Esperanto, kiu estas mem
lingva trezoro de la homaro, kaj pri la pli ol
centjara sperto de ĝia praktika utilo kiel ligilo
inter kulturoj,

Varme **bonvenigas** la decidon de Unuiĝintaj
Nacioj, ke la jaro 2008 estu Internacia Jaro de
Lingvoj, kaj alte taksas la iniciatojn de
Unesko en tiu kampo menciitajn en la mesaĝo
de ties Ĝenerala Direktoro al la Kongreso,
Reemfazas la neceson doni egalan respekton
al ĉiu lingvo, al ĉiu kulturo kaj al ĉiu homo
en la mondo,

Alvokas la Esperanto-komunumon disvastigi
Esperanton kaj ĝiajn valorojn de respekto al
ĉiu homo kaj de egaleco inter ĉiuj homgrupoj,
kaj per tio kontraŭbatali la malaperon de
lingvoj kaj kulturoj tra la mondo,

Invitas al kunlaboro kun ĉiuj organizaĵoj kaj
instancoj kiuj laboras por konservi lingvojn
kaj kulturojn kaj defendi lingvajn
homajn rajtojn,

Instigas ĉiujn agnoski la esencan valoron de
lingva diverseco, lige kun la kreskanta
agnosko pri biologia diverseco, kaj

Proponas al la monda komunumo science
esplori la rolon de Esperanto en pli efika kaj
justa komunikado tra la mondo.

<http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php>

de UEA elekti s-ron Simo Milojevic kiel Honoran Membron de UEA.

Simo Milojevic naskiĝis (1936) en Kunja Glavica, Trebinje (Hercegovino), Jugoslavio. Li esperantistiĝis fine de 1956. En la komenco de sia movada aktivado li estis sekretario de loka Esperanto-klubo, poste de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio kaj de Jugoslavia Esperanto-Instituto. En 1963 li estis ĉefredaktoro de "*Jugoslavia Esperantisto*", poste de "*La suda stelo*" (1964, 1967-69). Kiel komisiito de UEA li restadis pli ol jaron (1960-61) en Hinda Unio kaj Nepalo por instrui Esperanton. Post sia transloĝiĝo al Nederlando, Milojevic redaktis la revuon "*Kontakto*" (1970-74). En 1974 li eklaboris en la Centra Oficejo de UEA, kiel vicdirektoro (1974-80) kaj redaktoro de "*Esperanto*" (1974-1984). De 1983 ĝis 1995 li estis ĝenerala direktoro de UEA. Li estis membro de la Akademio de Esperanto (1989-1998). Nun li loĝas en Trebinje (Respubliko Serba, Bosnio kaj Hercegovino).

Premio "Deguĉi" al Renato Corsetti

En la fermo de la 93-a UK en Roterdamo estis anoncitaj diversaj premioj kaj distingoj. La plej prestiĝan el ili, Premion Onisaburo Deguĉi, ricevis Renato Corsetti.

Premio Deguĉi estis starigita en la Jubilea Jaro 1987 per donaco de Oomoto por ĉiujare premii agadon, kiu pere de Esperanto antaŭenigas la internacian amikecon kaj solidaron en la spirito de Lazaro Ludoviko Zamenhof kaj Onisaburo Deguĉi. Pri la ricevanto de la Premio decidis la Estraro de UEA. La Premio konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj.

Aljuĝante la Premion al Renato Corsetti, la Estraro de UEA skribis: "Renato Corsetti estas unu el la plej elstaraj agantoj de Universala Esperanto-Asocio. Por li Esperanto estis ĉiam nedisigeble ligita al agado por pli bona mondo, por internacia amikeco, solidaro kaj paco. Antaŭenigi tiujn

idealojn signifas al li antaŭenigi Esperanton, kaj tute aparte, disvastigi ĝin precipe al tiuj partoj de la mondo, kie la Internacia Lingvo apenaŭ aŭ tute ne havas adeptojn. Tio instigis lin al pionira laboro por krei Esperantomovadon en multaj landoj de la Tria Mondo, precipe en Afriko kaj arabaj landoj, ĉiam celante, ke al la novaj esperantistoj la posedo de la nova lingvo fariĝu rimedo por plivastigo de siaj spiritaj horizontoj kaj por persona kresko."

Interreto: *lernu.net* kaj *edukado.net* estis diplomitaj

La Estraro de UEA rajtas rekoni eksterordinare meritplenan agadon por la Internacia Lingvo per Diplomo pri Elstara Agado. La Diplomo estis starigita pasintjare. En 2008 ricevis ĝin du interretaj projektoj: *lernu.net* kaj *edukado.net*.

-lernu.net estas plurlingva paĝaro, kiu estis lanĉita en 2002 kaj celas helpi al ret-uzantoj informiĝi kaj lerni Esperanton senpage kaj en facila maniero. Verŝajne ne estas troigo diri, ke nuntempe ĝi estas la plej granda lernejo de Esperanto en la mondo. Ĝi estas vizitata averaĝe 75.000 fojojn monate. Ĉirkaŭ 7000 lernantoj jam kompletigis la unuan parton de ĝia baza kurso kaj 1500 lernantoj finis ĝian lastan, okan parton.

-edukado.net estas retejo por instruistoj, prizorgata de Katalin Kováts. Ĝi celas subteni kunlaboron inter instruistoj, sed ĝi estas ankaŭ helpilo por mem-lernantoj. Ĝi estis lanĉita en 2001 kaj renovigita en 2005. En la retejo troviĝas i.a. katalogo de lerniloj, "lerniloteko" por interŝanĝi ekzercojn kaj testojn, legejo de lernosubtenaj materialoj, koresponda servo, ktp. La teamo de edukado.net liveris nemalhaveblan helpon por realigi la Esperantan version de la Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoekzamenoj kaj de kelkaj jaroj prizorgas paroligajn lecionojn en UK-oj.

Premio “Grabowski” al du interlingvistoj

Fondaĵo Antoni Grabowski de UEA subtenas elstarajn atingojn de la Esperanta kulturo, precipe, sed ne nur, en la kampo de beletro. Ĉi-jare ĝiaj premioj havis interlingvistikan fokuson. La komisionanoj de la Fondaĵo (Ulrich Lins, Istvan Ertl kaj Mine Yositaka) aljuĝis du egalrangajn premiojn, je la valoro de po mil usonaj dolaroj, al Ilona Koutny kaj Andy Kuenzli.

Ilona Koutny, hungara lingvistino vivanta en Pollando, kreis kaj jam de dek jaroj animas la popularajn kaj rekonatajn Interlingvistikajn Studojn ĉe Universitato Adam Mickiewicz en la pola urbo Poznan. Spirita heredantino de prof. Istvan Szerdahelyi, ŝi kvazaŭ transplantis la Esperanto-fakon de la Budapeŝta Universitato ELTE en polan grundon, kie ĝi disfloris intermacie.

Andy Kuenzli, svisa politologo, pli ol 15 jarojn laboris super sia monumenta enciklopedio "Universalaj lingvoj en Svislando", kiu donas panoraman bildon pri 100-jara historio de la movado ne nur Esperanta, sed ĝenerale planlingva, en Svislando. La riĉa enhavo de tiu ĉi unika verko pri la planlingva movado de unu lando estas modela pro siaj scienca kompetenteco kaj objektiveco.

Subvencio “Cigno” favore al Srilanko

Subvencio Cigno estas donata ĉiujare por subteni agadon, kiu celas disvastigi Esperanton en evoluantaj landoj de la Tria Mondo. Ĝia valoro estas 500.000 japanaj enoj, t.e. proksimume 2950 eŭroj. La subvencion finansas la japana mecenato Miyoshi Etsuo kaj pri ĝia celo decidis ĉiujare la Estraro de UEA.

Ĉi-jare Subvencio Cigno estis asignita al la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) por ĝia projekto Agado Srilanko. La projekto temas pri presado de la jam preta vortaro sinhala-Esperanto-sinhala, kaj

Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2008

POEZIO:

Unua premio: Mikaelo Gishpling (Israelo) pro "Rekviemo";
Dua premio: Gerrit Berveling (Nederlando) pro "Mortis la Dioj";
Tria premio: Jean-Marie Ries (Luksemburgio) pro "Tiu vino" kaj "Lastaj pensoj de mortanta poeto".
Partoprenis 21 aŭtoroj el 16 landoj.

PROZO:

Unua premio: Lena Karpunina (Rusio) pro "Ordinara vizaĝo";
Dua premio: Sten Johansson (Svedio) pro "Kemio";
Tria premio: Lena Karpunina (Rusio) pro "Novaj tempoj".
Partoprenis 24 aŭtoroj el 15 landoj.

ESEO:

Unua premio: ne aljuĝita;
Dua premio: Luiza Carol (Israelo) pro "Esperantismo kaj vegetarismo: similaj trajtoj";
Tria premio: ne aljuĝita;
Honora mencio: Pieter Doumen (Belgio) pro "Lingvo: trezoro de la popolo".
Partoprenis 5 aŭtoroj el 4 landoj.

TEATRAĴOJ:

Unua premio: ne aljuĝita;
Dua premio: Geraldo Mattos (Brazilo) pro "Amo ne murdas";
Tria premio: ne aljuĝita.
Partoprenis 6 aŭtoroj el 6 landoj.

FILMO:

Partoprenis neniu valida konkursaĵo.

sendado al Srilanko de esperantisto el Barato aŭ Nepalo por gvidi konversacian kurson al la lokaj esperantistoj, kiuj ĝis nun estas izolitaj de la ĝenerala movado, kaj por rektametoda kurso al neesperantistoj.

La 94-a UK okazos de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2009 en Bjalistoko, Pollando.

Gazetaraj Komunikoj kaj Jubileanto

La UK 2010: en Havano!

Dum la ceremonio ferma de la Roterdama UK, estis anoncote la elekto de Havano, Kubo, kiel sidejo de la 95-a UK, kio estis jam entuziasme atendata ne nur de la kvinopa

kuba partoprenantaro en la UK, sed de multaj geesperantistoj kiuj dum la tuta semajno enketis nin kaj certe la estraranojn de UEA.

La decido estos ja granda defio kaj plezuro ne nur por la kubanoj, sed certe por la amerika esperantistaro tiel ke la UK-a moviĝo al nia kontinento certe kontribuos pliintensigi la tutamerikan movadon.

La kuba esperantistaro alfrontas la defion certa pri la sukceso kaj kiel kontribuo al plivastiĝo de nia Movado tra nia vasta kaj bunta kontinento. De nun malfermas invito kongresi en Havano, en 2010.

Kontakto: Kuba Esperanto-Asocio

**Poŝtfako 5120,
CU-10500 La Habana
Cuba**

Maritza Gutiérrez González

Konkurso

Kristnasko: bilde kaj poezie

Triesta Esperanto-Asocio starigas internacian konkurson en la jaro 2008 sub la temo *Kristnasko: bilde kaj poezie*.

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu, ĝis la **10-a de novembro 2008**, siajn verkojn al la jena adreso:

ESPERANTO TRIESTE –

C.P. 601 Trieste Centro

IT-34101 TRIESTE - ITALIA

Oni rajtas kontribui per unu aŭ pli da verkoj pri la supre indikita temo, en la kategorio:

1) desegnaĵo, maksimume unu A4-formata folio

2) poeziaĵo.

La desegnaĵo havu komenton aŭ frazon en la internacia lingvo Esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro.



La poeziaĵo estu en la internacia lingvo Esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro.

Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj:

- persona kaj familia nomoj;
- poŝta adreso;
- aĝo;
- lernejo kaj klaso.

Se eblas, bonvolu aldoni malgrandan foton de la aŭtor/in/o.

Ĉiuj konkursaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2008. La vizitontoj kaj elektota ĵurio donos poentojn al la plej bela verko el la du kategorioj. Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj; de 9 ĝis 11 jaroj; de 12 ĝis 14 jaroj) enkadre de publika ceremonio en Triesto.

Por kromaj detaloj/informoj:

noredv@tele2.it aŭ **testudo.ts@gmail.com**

Internacia Laborgrupo Lingvolanĉilo

**La strategia plano ekde
nun estas
elŝutebla ĉe:
www.edukado.net**

La Internacia Laborgrupo "Lingvolanĉilo" proponas, ke ĉiu infano ricevu *gepatralingvan edukadon* ĝis la fino de sia 8-a vivojaro, por akiri firmajn gepatralingvajjn konojn koncerne la parolon, legadon, skribon kaj kalkuladon.

Ni proponas, ke *Esperanto estu la unua fremda lingvo kaj kapabloevoluiga lernobjekto* en la 9-a, 10-a kaj 11-a vivojaroj, kaj poste, en la 12-a kaj 14-a vivojaroj la infanoj komencu lerni po unu, libere elektitan, nacian lingvon, por ke okaze de la abiturienta ekzameno ili *ĉiuj povu almenaŭ mezgrade kompreni tri fremdajn lingvojn*.

Intertempe ili povas ŝpari – helpe de la lernadfaciliga efiko de Esperanto – entute minimume la tempon de unu plena laborjaro. La ŝparitaj mono kaj tempo estas uzeblaj por evoluigo de aliaj, bezonataj kapabloj.

Ni kolektas la adresaron de tiuj esperantistoj, kiuj interkonsentas kaj pretas kunlabori por atingi la supre menciitajn celojn. Aparte gravaj estas la adresoj de tiuj Esperanto-instruistoj, kiuj jam nun instruas, aŭ intencas baldaŭ instrui la internacian lingvon en bazgradaj lernejoj.

La plej grava celo estas atingi, ke en ĉiuj eŭropaj landoj kreiĝu minimume 1-5 bazgradaj, "referencaj" lernejoj, kie oni instruas Esperanton. Ni volas antaŭenigi la kiel eble plej bonajn kontaktojn inter tiuj ĉi lernejoj.

Kontaktadreso de la laborgrupo:
ludoviko@t-online.hu

Rekta ligo:

<http://www.edukado.net/pagina/Lingvolernigaj+projektoj/18017/#18028>

Estas du versioj: PDF-versio, kiun estas por printi kaj multobligi, kaj la WORD-versio por prilabori, eventuale adapti al propraj bezonoj.



Projekto interkultura kaj multlingva dialogo per neŭtrala lingvo, inter la eŭropaj lernejoj

La celo de la projekto estas la kreado de partneraj rilatoj inter la lernejoj de malsamaj eŭropaj landoj en kiuj estas instruata la neŭtrala lingvo Esperanto. Ĝin oni uzas por la malĉeesta komunikado kaj dum la programitaj eŭropaj renkontiĝoj (du po jaro en du landoj), ĉar ĝi estas neŭtrala pontolingvo kaj garantias al ĉiuj partoprenantoj egalajn ŝancojn de komunikado kaj respekton kaj konservadon de multlingveco en Eŭropo kaj en la mondo.

La lernejoj jam interesitaj en tiu ĉi projekto estas nun el la sekvaj nacioj:

Portugaliao, Pollando, Francio, Hungario, Litovio, Bulgario, Germanio, Hispanio, Italio kaj Britio (certe la projekto estas malfermata al ĉiuj lernejoj kiuj deziras aldoniĝi). Ili ekpaŝos al reciproka kono kaj kultura interŝanĝo kiuj, respektante la historiajn kaj kulturajn heredaĵojn kaj tradiciojn de la diversaj, partoprenantaj eŭropaj landoj, stimulos la reciprokan konon kaj la lernadon de la naciaj lingvoj de tiuj ĉi landoj uzante kiel ponto la neŭtralan lingvon Esperanto.

Multaj iniciatoj estos realigataj kuntrenante geinstruistojn kaj gelernantojn kiuj partoprenos kune kun aliaj organizoj kaj antaŭenpuŝos komunajn temojn kaj ideojn. La kunlaborado baziĝos sur la interŝanĝo de informoj pri la historiaj kaj kulturaj heredaĵoj de la diferencaj regionoj kaj landoj pere de la spertoj en la kampo de la informteknologioj kaj de la instruado de fremdaj lingvoj kaj pristudante la ideon pri la estonteco kaj pri la nuntempo de la eŭropa civitaneco de la novaj generacioj.

La realigo de tiu ĉi projekto, pere de la kono de la kulturo kaj de la tradicioj de aliaj eŭropaj landoj kaj de kreado de ligoj de amikeco kun gestudentoj kaj geinstruistoj loĝantaj tie, kontribuos al detruo de la komunikaj baroj inter komunumoj de diversaj lingvoj metante antaŭ ilin la samajn defiojn. Por la realigo de la projekto ni

uzadas la internacian lingvon Esperanto – jam multe konata, tamen ankoraŭ ne oficiala lingvo de EU.

La uzo de iu sama lingvo, ne gepatra por ĉiu ajn de la partoprenantaj landoj, tamen instruata en la lernejoj de tiuj landoj, kreos senton de egaleco kaj egalrajteco, ekde la plej baza: la rajto je parolo kaj komunikado de la propraj ideoj, kaj en la gepatra lingvo kaj en tiu neŭtrala, kaj



kuraĝigos la junajn eŭropanojn ekkonscii, ke la komunika streĉo de iu por iri renkonte al la alia estas jam signo de akcepto kaj de respekto de la diverseco, do, simbolo de toleremo.

Celoj de la projekto

- a) Antaŭenigi la interkulturon kaj informi la partoprenantojn pri la lingvaj malsamecoj, ankaŭ pere de lernado de frazoj uzataj ĉiutage en la lingvoj de la landoj partoprenantaj en la projekto.
- b) Interŝanĝi kulturajn, tradiciajn, lingvajn, geografiajn kaj historiajn spertojn.
- c) Kritikema pensado pri la “ismoj” (naciismo, koloniismo, rasismo...) de la gestudentoj pere de realigo de lokaj kaj transnaciaj debatoj, pri la homaj rajtoj, pere de esploroj, ekspozicioj kaj retaj forumoj kaj kontaktoj kun ĉeestantaj samaĝuloj de aliaj lernejoj de la partneraj landoj.
- d) Superi la komunikajn barojn en Eŭropa

Unio pere de komuna neŭtrala lingvo.

- e) Kontribui al formado de spirito de eŭropa civitano.
- f) Evoluigo de la personaj ecoj en la lernantoj kiel kapablo labori teame kaj deziro je kunlaborado, kompetento en la solvoj de la komunikadproblemoj.
- g) Plibonigi la asimilon kaj la praktikan uzon de la novaj teknologioj de komunikado (retpoŝto kaj videokonferenco) por atingi pli bonan interkomprenon inter la partneroj.
- h) Motivigo de la gestudentoj por pli bona engaĝiĝo en la agadoj de la lernejo dank'al akurata publikigo de la finaj rezultoj.

Entenoj kaj Agadoj

- Kolektado de aĵoj pere de kiuj ilustru la historian kaj kulturen heredaĵon de la eŭropaj partoprenantaj landoj.
- Preparado kaj aranĝo de fotoekspozicio kaj de fotoalbumo pri la temo “Mia lando”.
- Realigo de retaj konektiloj inter la partneroj.
 - Konkurso pri “Mi vivas en Eŭropo: mia eŭropa civitaneco”.
 - Arta konkurso pri la temo “Mia malproksima amiko / Mia malproksima amikino” kun ekspozicio en la koncernaj lernejoj de la laboraĵoj de ĉiuj kulturenataj eŭropaj gejunuloj.
 - Renkontiĝoj en videokonferencoj inter la junaj eŭropanoj kaj realigo de komuna TTT-paĝo por la dokumentado kaj la kunpartigo de la sperto.
 - Formado, en ĉiu lernejo, de ĉiamdaŭraj laborgrupoj de gestudentoj, geinstruistoj kaj gepatroj por interkultura dialogo, konstanta interlingvistika kaj interkultura memformado.

La projekton kunordigas profesoro Mariana Genĉeva

maries972@yahoo.com

ul. Targovska 101,
BL-5180 Polski Trambesh,
Bulgario



Comunicamos a nuestros lectores que:

1.- Los costos de impresión y en particular los costos de envío han experimentado un significativo incremento, (el franqueo "impreso" hasta 100gs de \$2 pasó a costar \$2,50).

2.- Los aportes de socios, en los últimos meses, han sido relativamente pocos, **por lo tanto**, si hasta la fecha Ud. ha recibido en su domicilio nuestra revista impresa pero no ha realizado su aporte correspondiente, la misma no podrá ser enviada por correo postal. De no contar con una respuesta satisfactoria al respecto, la redacción lamentablemente deberá interrumpir los envíos gratias.

Además, deseáramos saber si:

- * el contenido de la revista es de su interés.
- * la calidad de la revista no es la esperada.
- * el contenido es escaso.
- * no lee la revista.
- * lee la revista virtual y no la impresa.
- * el correo postal no la entrega en tiempo y forma.
- * la redacción ¿posee su dirección actualizada?
- * a aportado y no se lo han reconocido.
- * no desea aportar más para la revista.
- * desea recibirla pero no puede abonar.

Esperamos su respuesta a la dirección electrónica del secretario/tesorero:

sekretario@esperanto.org.ar

o la dirección de esta redacción:

rubendiaconu@yahoo.com.ar

Sugerencia: Debido a que la comisión bancaria por depósito es elevada, se recomienda efectuar envíos o depósitos comunitarios, por un mismo costo.

AEL Jarkotizo

Individua Membro:\$ 30,00

Junulo kaj Emerito:\$ 15,00

Virtuala Membro [kaj donacoj]: laŭvole

Anuncios

AEL necesita su adhesión

Si Ud desea abonar su adhesión, colaborar con las tareas de AEL o adherirse a UEA envíe su aporte mediante depósito en Banco Francés, [sin costo], cuenta N° 147005789/3, a nombre de: Alcides Pieter Wentinck, DNI 93.709.394, Calle Libertad 3226 B1602DJD Florida, Vicente López Buenos Aires y luego indefectiblemente informe sobre dicha operación a: wanelec@sion.com

Si desea colaborar con la edición y distribución de la revista *Argentina E-Vento* también puede enviar su contribución mediante el "Banco Patagonia", depositando su aporte en "Caja de Ahorro" suc. 110, Sáenz Peña, cuenta N° 394101439, del Sr. Oscar C. Monge, [sólo se descontará \$7,27 como gasto bancario por depósito].

Rogamos siempre informar sobre su operación a esta redacción: rubendiaconu@yahoo.com.ar.

Agradecimientos

Por las adhesiones y colaboraciones recibidas AEL agradece a: J. Bustos Cabanillas [Catamarca], C. Beneitez [Córdoba].

La Redakcio kore dankas pro jenaj E-ricivaĵoj: Esperanto [NL], Heroldo de Esperanto [CH], La KancerKliniko [FR], La Espero [SE], Bazaro [RO], Antaŭen [ES], Gaja Haveno [BR], Informilo de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo [PL], Avanco [CU], Bona Volo [BR], Kiam mi estis la plej feliĉa en la vivo? [RO], Gaŭĉa Stelo [BR]. Se via sendo ne aperas Bv. informi al la Redakcio.

Distraĵo / Por la animo / Literaturo

Preĝo por la Paco



Konduku min
el la morto en la vivo,
el la misago en la veron.

Konduku min
el la malespero en la esperon,
el la timo en la konfidon.

Konduku min
el la malamo en la amon,
el la milito en la pacon.


Ke la paco plenigu niajn korojn,
nian mondon, nian universon.

Tiel estu (Amén)

Mantra Preĝo por la Paco
Satish Kuma
(hinda disĉiplo de M. Gandhi)
Tradukis el la hispana:
Abel Weiner
Esperanza, Santa Fe

Ĉe la “limo de la Mondo”

Nova blogo por paroli pri
E-literaturo. Mallongaj poemoj,
romanoj, kantaĵoj,
originalaj verkoj
kaj ankaŭ tradukitaj,
ligiloj al interesaj ttt-ejoj
rilatigitaj a la E-literaturo,
kaj kelkaj desegnoj,
kaj fotoj, havas
lokon tie.



Vizitu:

<http://limodelamondo.blogspot.com/>

Feliĉan datrevenon!

Ni gratulas kaj bondeziras nian s-anon
Rodolfo Calógero (Neuquén), okaze de
sia naskiĝdatreveno, la 19-an de
septembro.

Redakcio de Argentina Esperanto-Ligo: Calles 119 y 122, AR-H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña, Argentino

Sr/a :

